

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

Nº 6 (31) decembro 2005



en la numero

*REU kaj REJM unuigis la membrarojn
rakontoj kaj impresoj pri VER-13, LF-10
neforgesebla vojaĝo al Japanio
novaj versaĵoj kaj tradukoj de Mikaelo Bronŝtejn
"Mirt" – la rakonto de Lena Karpunina
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia*

Moskvo, 2005

enhavo:

- 01 VER-13
- 02 Lingva Festivalo en Ĉeboksari
- 03 Zamenhofa Semajnfino en Kaliningrado
- 05 Neforgesebla vojaĝo al Japanio
- 11 Ekonomia analizo malkonsilas la anglan
- 12 REU kaj REJM unuigis la membrarojn
- 12 Malferma tago omaĝis oficejan jubileon
- 13 UEA kaj ILEI reprezentigis en la Ĝenerala Konferenco de Unesko
- 13 Nova membrokarto de UEA enkondukita
- 13 Kion donas membriĝo en REU?
- 14 Novaj REU-aligoj por 2005
- 14 Novaj REU-aligoj por 2006
- 15 Kotizoj de REU por 2006
- 16 Esperanto-sekcio en Ŝumerlja
- 16 Kongresa temo en Florenco
- 16 Letero el Kabulo
- 17 Infana Kongreseto en 2006
- 18 72-a IKBE en Florenco
- 18 Samarkandanoj montopintas en Japanio
- 19 DVD en Esperanto estas mendebla
- 19 Aboneblaj revuoj kaj UEA-membreco en 2006
- 20 Sep bibliotekoj ricevis Thorsen-apogon
- 20 Estas fondita IEAVP
- 21 Kia devas esti moderna Rusa-Esperanta vortaro
- 22 En januaro aperos dua eldono de Rusa-Esperanta vortaro
- 22 Aperis nova Esperanto-rusa vortaro
- 22 Novaj versaĵoj kaj tradukoj de Mikaelo Bronŝtejn
- 28 "Mirt" – la rakonto de Lena Karpunina
- 17, 21 anekdotoj
- k3 Amuzaj misskriboj kaj eraroj
- k3 Esperantistoj-eruditoj
- k4 Feliĉon al ĉiuj en 2006!



Jurij Karcev,
la ĉeforganizanto de VER-13

REGo **(Rusia Esperanto-Gazeto)**

№ 6 (31) decembro 2005

aperadas ekde 2000

redaktas Garik Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Grišin

*materialoj de REGo povas esti
represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos
senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto*

poŝta adreso: Pjaticnikoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2006:

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj
de KŜŜ – 180 rubloj sendendaj al:*
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

*por loĝantoj de aliaj landoj – 18 eŭroj
pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*

😊 AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ 😊

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – artikoloj kaj informoj, senditaj por REGO: *akcidentukrainiaj esperantistoj* (anst. okcidentukrainiaj); *delegitoj de ŝatoj* (anst. ŝatoj); *etlevido* (anst. televideo); *emlinio* (anst. temlinio); *la estararo* (anst. estraro); *membroŝatoj* (anst. membroŝatoj); *raspilo* (anst. rastilo); *unulinoj* (anst. junulinoj).



ESPERANTISTOJ-ERUDITOJ



Kelkaj esperantistoj en Moskvo kaj aliaj urboj aktive partoprenas en diversaj intelektaj konkursoj por erudiciuloj. (Necesas diri por tiuj, kiuj ne scias, ke la movado de erudiciuloj kun multegaj plej diversaj turniroj kaj ĉampionadoj estas tre vasta kaj

populara en Rusio kaj ruslingvaj diasporoj en aliaj landoj.) Ĝis nun tiuj aktivadoj plej ofte pasis paralele al la Esperantaj. Sed jen, la 27-an de novembro en Moskvo okazis malfermita turniro pri “Erudit-kvarteto”. Tiu ĉi speco de intelektaj ludoj pasas simile al “Propra ludo”, sed konkurso teamoj, kiuj delegas siajn



membrojn por ludi apartajn temojn. En la turniro partoprenis la teamo “Esperanto”, kompilita el la spertaj esperantistoj (kaj samtempe ne malspertaj ŝatantoj de intelektaj ludoj) Viktor Aroloviĉ (kapitano), Valentin Melnikov, Garik Kokolija. Ĉar laŭ la reglamento la teamo devas konsisti el kvar personoj, por kompleteco estis kooptita simpatianto de Esperanto, forta intelektludanto Vadim Kalaŝnikov.

En la turniro partoprenis 13 teamoj, konsistantaj ĉefe el spertaj moskvaj erudiciuloj, sed partoprenis ankaŭ fortaj ludantoj el Peterburgo, Pereslavl'-Zalesskij, Voroneĵ kaj eĉ el Ukrainio. Preskaŭ ĉiuj partoprenintoj estas konataj laŭ la partoprenoj en “Kio? Kie? Kiam?”, “Propra ludo” kaj la plej altnivelaj sportaj (t.e. ne televidaj) intelektaj ludoj. La rezulto de nia teamo superis ĉiujn esperojn – ni gajnis la trian lokon! La erudiciula komunumo (ankaŭ la esperantista) refoje konvinkiĝis, ke la nocioj “Esperanto” kaj “intelekt” estas ne tute fremdaj unu al la alia!

Garik Kokolija (Moskvo)

felicion al cunj



en 2006!